# LA MIRINDA LIBRO



OMAĜE AL
RAMON MOLERA

## BONA PERSONO

La tempo rapide forflugas kaj kun melankolio ni rememoras la tagojn de nia infaneco. Ofte la elvoko de pasintaj tagoj venas al nia memoro...

La somera tago estis belega, la suno forte brilis, la cikadoj kantis kaj mi ludis en la strato kun miaj geamikoj, tiam la aŭtomobiloj en la stratoj de la vilaĝoj estis malmultaj. Je la unua horo tagmeze mia patrino vokis min, estis la horo de la tagmanĝo. Ĵus ni sidiĝis kaj iu frapis la pordon, tuj mi malfermis ĝin kaj antaŭ mi, aperis sinjoro kun blonda barbeto, kun pipo en maldekstra mano kaj kun libreto en la dekstra

–Bonan tagon fraŭlineto!

–Bonan tagon sinjoro!

–Ĉu la sinjoro... delegito de UEA estas en la domo?

–Jes!

Mi tuj respondis, tiam eliris mia patro kaj la sinjoro salutis lin

–Bonan tagon sinjoro! Ĉu vi estas la Delegito de UEA en la vilaĝo?

–Certe sinjoro, bv. eniri, ĵus ni komencas tagmanĝi, sidiĝu kaj tagmanĝu kun ni.

La sinjoro sidis kaj manĝis el nia supo, el nia viando kaj el niaj piroj, manĝante li rakontis ke dum sia vojaĝo tra la lando kaj transirante nian vilaĝon, trovis la adreson de la Delegito de UEA kaj decidis viziti lin. Estis angla kaj lia domo estis la aŭtomobilo. Restis dankema pro nia ĝentileco, kaj tuj naskiĝis amikeco. Ofte oni povis vidi en la stratoj de la vilaĝo aŭtomobilon kun verda stelo.

Ankaŭ mi bone rememoras ke alveninte de la lernejo

kun, por mi, malfacilaj matematikaj ekcerzoj, li helpis min en la solvo.

La unuan tagon de lia vizito mi ne povis kompreni ke nekonatulo tagmanĝas kun ni, kaj kun mia ses jara infaneco, vespere demandis al mia patro:

–Panjo, kial vi permesis eniri al tiu sinjoro sen koni lin?
Ofte vi diras ne permesu al nekonatuloj eniri en la domon.

–Mia kara, vere mi ne konis lin, sed li portis Jarlibron kaj salutis min Esperante kaj vi devas scii ke ESPERANTISTO ESTAS BONA PERSONO!!!

**Ana María Molera**